

# Glacimonto

Glacimonto estas tre granda glacia aĵo, konsistanta el glaĉerglacio, libere flosanta kaj drivanta en oceano aŭ lago. Glacimontoj estiĝas per forrompiĝo de glaĉersokloj (glacitavoloj naĝantaj en maro aŭ lago, ligitaj kun glaĉeroj aŭ glaĉersĝildoj) ekzemple en Antarkto aŭ per deidiĝo de glaĉerblokoj de glaĉerlangoj, kiuj fluas al la maro aŭ al lago.

Glacimonto drivas sur akvo. La rusa verkisto kaj sciencisto Miĥail Lomonosov estis la unua por science kompreni tion (ĉ. 1750): ĉar la denseco de glacio estas nur 0,920 kilogramoj po litro, dum tiu de mar-akvo estas 1,025 kg/l kaj rezultiĝas ke 90% de la volumeno de glacimonto troviĝas sub la akvosurfaco.

Flosanta glacimonto estas speco de flosglacio.

La plej granda flosglacio deiĝis en 1956 ĉe Antarkto, ĝi longis 335 km, larĝis 97 km kaj la surfaco estis 31 000 km<sup>2</sup>.

Glacimontoj prezentas grandan danĝeron al ŝipoj. Plej fame, la vaporŝipo RMS Titanic trafis glacimonton la 14an de aprilo 1912, kaj rezultis pereado de la ŝipo kaj de ĉ. 1500 ŝipanoj.

Retpaĝo: [www.traduki.de](http://www.traduki.de)

Teksto: [eo.wikipedia.org/wiki/Glacimonto](http://eo.wikipedia.org/wiki/Glacimonto)